

Heinrich Heine,
Lurleia

tradukita de N. N. 01

Heinrich Heine,
Lorelej'

tradukita de Leopold Elb

Heinrich Heine,
[Ne scias mi, kio okazis]

tradukita de Paul Gottfried Christaller

Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.

El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".

Ignoro, quid id sibi velit,
Tristissimus cur sim,
Antiqui aevi fabellam
Cur saepe volverim.

Vesperascit et frigescit,
Et Rhenus leniter it,
Cacumen montis lucescit,
Dum Phoebus occidit.

Sedet in summo montis
Virgo pulcherrima,
Auro nitet gemma frontis,
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pectit,
Carmen canens procul,
Mirandum id habet modum
Nec non virilem simul.

In cymba navitam mille
Angores feri tenent,
Non videt scopulos ille,
Ocli non si sursum vident.

Opinor undas devorare
Nautam cum navicula,
Effecit solo canendo
Lurleia id dea.

...

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,
Fluadas la Rejn' en trankvil',
La supro de l' monto lumiĝas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas
Ŝipisto dum sia vetur';
Rifaron li ne priatentas,
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronos finfine
Ŝipisto kun sia boat',
Kaj tion kaŭzis feine
La Loreleja kantad'.

...

Ne scias mi, kio okazis
al mia tristema kor':
Antikva legendo min kaptis,
ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile
murmuras kiel mister',
la supron ŝtonegan orumas
sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas
mirinda sur la montet'
kaj ŝia oraĵo radias,⁴
ŝi logas kiel magnet'.

Ŝi kombas la oran hararon
abundan per ora kombil',
kantante misteran lidon,⁵
ravantan kiel sunbril'.

Ŝipisto en sia ŝipeto
kaptiĝas per stranga dolor',
la rifon li tute ignoras.
atentas nur ŝin kun fervor'.

Mi kredas: la ondoj englutas⁶
ŝipiston, ŝipeton je l' fin',
kaj kulpa pri tio nur estas
kantado de la virin'.

...

⁴En la sube menciita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

⁵En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

⁶Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.

*Traduko de la Germana poemo
“Die Lorelei” de HEINRICH HEI-
NE (*1797-12-13 – †1856-02-17)
en la Latinan de N. N. 01.*

*Arg-2-179 (2010-02-11
14:00:52)*

*Traduko de la Germana poemo
“Die Lorelei” de HEINRICH HEI-
NE (*1797-12-13 – †1856-02-17)
en Esperanton de LEOPOLD ELB
(†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

*La traduko troviĝas sur paĝo 84
de la lernolibro „Post la kurso“ de
Wilhelm kaj Hans Wingen, eldo-
nita de Ludwig Pickel en Nurem-
bergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo
“Die Lorelei” de HEINRICH HEI-
NE (*1797-12-13 – †1856-02-17)
en Esperanton de PAUL GOTTFRIED
CHRISTALLER (*1860-08-
21 – †1950-12-31).*

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis
tiun ĉi tradukon el la libreto
“H. Heine - Libro de Kantoj”,
eldonita en 1911 de la “Esperanto-
Propaganda Instituto” (Leipzig,
Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a el-
dono. [Sur la frontpaĝo de la
kajero estas malsupre indiki-
ta ankaŭ: Eldonejo Rothermel,
Friedrichswerth (Thüringen) kaj
supre: Popola Biblioteko Espe-
rantista n-ro 2.] Die deutsche
Urfassung von Heinrich Heine
siehe: “Buch der Lieder”, Abschnitt
“Die Heimkehr”. - Informoj pri la
tradukinto Paul Christaller tro-
viĝas en la vikipedia retejo [http://de.wikipedia.org/wiki/
Paul_Gottfried_Christaller](http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller),
kun foto de li.*